

IV PASKA DIMANĈO – 11an de majo 2014

MI ESTAS LA PORDO POR LA ŜAFOJ – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Johano 10,1-10

En tiu tempo Jesuo diris: „Mi certigas vin: se iu eniras en la ŝafejon ne tra la pordo, sed grimpante de alia parto, tiu estas ŝtelisto kaj rabisto. Sed kiu eniras tra la pordo, estas la paŝtisto de la ŝafoj. Al li la pordisto malfermas, kaj la ŝafoj aŭskultas lian voĉon; li vokas ilin laŭ iliaj nomoj kaj elkondukas ilin. Kiam li elirigas siajn ŝafojn, li iras antaŭ ili. La ŝafoj sekvas lin, ĉar ili konas lian voĉon. Male, fremdulon ili ne sekvas, ĉar ili ne konas la voĉon de fremduloj.”

Jesuo diris al ili ĉi tiun alegorion, sed ili ne komprenis la signifon de liaj vortoj. Tiam Jesuo diris denove al ili: „Mi certigas vin: Mi estas la pordo por la ŝafoj. Ĉiuj, kiuj venis pli frue ol Mi, estis ŝtelistoj kaj rabistoj; sed la ŝafoj ne aŭskultis ilin. Mi estas la pordo: se iu tra Mi eniras, tiu saviĝos; li povas eniri kaj eliri, kaj trovos manĝon. La ŝtelisto venas nur por ŝteli, buĉi kaj pereigi; sed Mi venis por ke miaj ŝafoj havu vivon, kaj havu ĝin abunde.”

Pro la fakto ke li malfermis la okulojn al blindulo, Jesuo estis konsiderata de la religiaj estroj kiel malamiko de Dio, pekulo. Do nun estas Jesuo kiu sin adresas rekte al ili, Jesuo parolas al la fariseoj en la ĉapitro 10 de la evangelio de Johano, priskribante la sinnomantajn ŝafistojn de Izraelo per la samaj karakterizoj de la lupoj. Kiel la lupoj, fakte, ili estas ŝtelistoj kaj rabistoj.

Stelistoj ĉar ili alpropriĝis de tio kio ne estis ilia, kaj rabistoj ĉar ili utiligas la perforton por submeti la popolon. Sed ni vidu tiun gravan pecon

de Johano, kiu entenas tre severan admonon al tiuj kiuj pretendas esti la ŝafistoj de la popolo.

Jesuo deklaras malferme ke ĉiuj tiuj kiuj pretendis esti la gvidantoj de la popolo, estas rabistoj – ili uzis la perforton – kaj estas ŝtelistoj ĉar ili alpropriligis al si la gregon kiu estis de Dio, certe ne ilia. Nun male aperas Jesuo, la laŭrajta ŝafisto.

Kaj la laŭrajta paŝtisto sin priskribas kiel tiu kiu *“eniras tra la pordo”* kaj *“la ŝafoj aŭskultas lian voĉon”*. Kial la ŝafoj? La grego estas la bildo de la popolo. Kial ili aŭskultas lian voĉon? Ĉar la personoj rekonas en la vortoj de Jesuo la respondon de Dio al la bezeno de vivpleneco kiun ĉiu homo portas en sia sio. Tiu estas la forto de la mesaĝo de Jesuo. Nu, kiam oni aŭskultas tiun voĉon, oni vidas en la mesaĝo de Jesuo la respondon al propra bezono de vivpleneco, Jesuo starigas personan rilaton kun ĉiu unuope, *“li vokas ilin laŭ iliaj nomoj kaj elkondukas ilin”*.

La vorto “elkonduki” estas la sama utiligata en la Antikva Testamento por indiki la Eliron. Tiu de Jesuo estas liberigo, li foriras la gregon de la kaĝo, de la halo de la juda religia institucio, ne por ilin enfermi en alian kaĝon, sed por doni al ili la plenan liberecon. Fakte, skribas la evangeliisto, ke kiam Jesuo *“elirigas siajn ŝafojn, li iras antaŭ ili. La ŝafoj sekvas lin, ĉar ili konas lian voĉon”*.

Tio kio plutenas la fidelecon al la sinsekvo de Jesuo estas ke en la voĉo de Jesuo aŭdeblas la respondo al la bezonoj de la homo. Jesuo do ne enfermas la ŝafojn en alian kaĝon, sed donas al ili la liberecon. Poste, pli ol konstato, estas konsilo tio kion Jesuo ŝajnas doni, *“Fremdulon ili ne sekvas, sed ili fuĝos for de li”*.

Fuĝi, tio estas la konsilo kiun Jesuo donas. Fuĝi for de tiuj kiuj ŝajnas ŝafistoj, reale ili estas lupoj. Kaj, kiel tiaj, portas nur la detruon. Ili fuĝos for de li kial? *“ĉar ili ne konas la voĉon de fremduloj.”* La ŝafoj, la grego, la popolo konas la voĉon de tiu kiu ilin amas, sed ne la voĉon de tiu kiu volas ilin ekspluati. Ili estas fremdaj, kial? Ĉar ili ne aŭskultas la voĉon de la popolo, ne estas proksimaj al la personoj. Jen do ke la popolo ne aŭskultas ilian voĉon, ĉar ili havas nenion por diri al ili.

Nu, komentis la evangeliisto, *“Jesuo diris al ili”* al la fariseoj, *“ĉi tiun alegorion”*, tre tre klara kaj tre severa, *“sed ili ne komprenis la signifon de liaj vortoj”*, Kiel do ili ne komprenas? Ĉar tiuj ne estas iliaj ŝafoj. Ili ne

deziras vivplenecon. Ili nature ne estas surdaj, sed obstinaj. Ili komprenas ke, se ili akceptas la mesaĝon de Jesuo, ili devas perdi sian tutan povon, sian prestiĝon kaj, anstataŭ superregi, ili devas sin meti, kiel estas faranta Jesuo, je la servo de la aliaj. Kaj tion la aŭtoritatuloj, la estroj, la fariseoj, tion ili ne volas.

Ili volas praktiki la regon super la popolo, ne la servadon. Do Jesuo, konsiderante ke ili ne komprenis, per maniero eĉ pli kruda kaj klara, pretendas esti *"la pordo de la ŝafoj"* kaj, asertas Jesuo, *"Ĉiuj, kiuj venis pli frue ol Mi, estis ŝtelistoj kaj rabistoj; sed..."* jen la konstato, *"la ŝafoj ne aŭskultis ilin."*

La popolo povas esti subigita pro timo, sed ne pro elekto. La popolo povas esti superregata, povas esti submetita, sed kiam fine ĝi aŭskultas la liberigmesaĝon, aŭskultas amomesaĝon, jen la popolo renaskiĝas. Jesuo do certigas ke la popolo neniam ilin aŭskultis. Ili trudis sian mesaĝon, ĝin devigis, sed ilin ne konvinkis.

Jesuo male ne trudas la mesaĝon, ĝuste ĉar lia vorto konvinkas. Tiu estas la karekterizo kiu distingas la mesaĝon venantan de Dio kaj tiun ne venantan de Dio: la unua estas proponata, ĉar estas amomesaĝo kaj la amo povas esti nun proponata, kaj neniam trudata. La mesaĝo de la religiaj aŭtoritatoj male estas trudata, ĝi estas doktrino kiu estas trudata, kial? Ĉar la estroj estas la unuaj kiuj ne kredas je ĝiaj beneficoj.

Se io bonas ne necesas ĝin trudi. Kaj daŭrigas Jesuo, pretendante ankoraŭ esti la pordo, pordo kiu tamen me fermiĝas. Diras Jesuo: *"se iu tra Mi eniras, tiu saviĝos; li povas eniri kaj eliri..."* Jesuo ne venas por enfermiĝi en alian kaĝon, sed por doni la plenan liberecon, ĉar, nur kie estas la plena libereco estas la digno kaj la pleneco de la homo.

Kaj ĉi tie la evangeliisto skribas ke *"trovos manĝon."* Kaj li utiligas la vorton 'manĝon' kiu en la greka estas nomè, kiu tre similas al nomos, kiu signifas 'leĝo'. En Jesuo ne troveblas doktrino respektenda, sed paŝtejo, la amo kiu nutras la vivon de la personoj. Kaj fine refoje la konkludo *"La ŝtelisto venas nur por ŝteli, buĉi kaj pereigi;"* Jesuo do ligas la paŝtistoj al la ŝtelistoj, tio estas al la lupoj. Tiuj kiuj ŝajnas la paŝtistoj kiuj devus defendi la gregon de la lupoj, estas plej malbonaj ol la lupoj, ĉar iu la lupojn timas, dume je la paŝtistoj havas fidon.

Kaj, konkludas Jesuo: "*Mi venis por ke miaj ŝafoj havu vivon, kaj havu ĝin abunde*". La estroj de la popolo alpropiigis al si la personojn, ilin portante al ruino. Estas ili kiuj, en la nomo de Dio, ekspluatadis la popolon, ĝin oferante al propraj ambicioj, al propra povosoifo, nesentivaj al la oferoj kiujn ili trudas kaj al la suferoj kiujn ili kaŭzas.

Sed nun alvenis Jesuo kaj lia mesaĝo estas la respondo de Dio al bezono je vivpleneco kiun ĉiu persono havas ene de si mem. Kaj, kiam oni aŭskultas tiun ĉi voĉon, ĉiuj aliaj malgraviĝas.